Universala Esperanto-Asocio

AKTIVULA MATURIGO ktp

Estrara Subteamo: MOVADO

EKO 2016-07 sendita el Chitwan en suda Nepalo,  la 3an de marto.

Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, la E-gazetaro kaj radiostacioj, listoj kaj unuopuloj (petu senpagan ricevon!).

# La kompletigo de AMO 20 – vigla forumo

Revenis por la dua kaj tria tago 30 kaj 25 seminarianoj, respektive. La dimanĉa programo ekis per prezento de la ĵus alveninta s-ro Jasuo Hori el Japanio, kun temo 'Ĉio devas esti interesa'. Lia sesio sendube estis varia kaj interesa kaj plene kaptis la atenton kaj aktivigon de la publiko; tio ekzempligis la deziratan aliron al nia varbaj kaj instruaj klopodoj. Lia unua ero estis kantado de la himno, unue kune, poste unuope en vico laŭ disdonitaj kartoj. S-ro Hori premias homojn, kiuj kapablas kanti la himnon parkere. La dua ero estis prezento de alia lia projekto, konkurso 'Sumoo'. Tio celas stimuli la legadon de Esperantaj libroj; oni konkursas ne kontraŭ aliaj, sed kontraŭ si mem. Trie li prezentis siajn verkojn, interalie pri la nuklea katastrofo en Fukuŝimo. Sekva temo estis la arigo de salutoj favoraj al paco, arigitaj el la tuta mondo. Esperanta bingo estis demonstrita, kun premioj. La ludado havas lingvolernan valoron, ĉar la literojn oni devas diveni laŭ vortdifinoj aŭditaj. La fino estis parolanta pupo ('mia filo') kaj demonstro de kolekto de ekzotaj muzik-instrumentoj. Por realigi tion, s-ro Hori venis kun tia valizplenego, kiu hontigus eĉ la plej ardan Ĉe-instruiston.

Post paŭzo prelegis s-ro Bharat Ghimire el Nepalo, unu el la organizintoj de la seminario. Lia temo: kiel varbi esperantistojn. Evidente li kaj liaj kolegoj havas talenton pri tio, ĉar triono de la seminarianoj estis universitataj studentoj, varbitaj de la nunaj gvidantoj de NEspA. Lia komenca tezo estis, ke doni la nudajn faktojn ne sufiĉas, oni devas iel engaĝi la emociojn kaj la psikon. Li citis la vortojn de la belga esp-isto Ivo Durvael: 'Se ideo estas bona, ĝi ne allogas.'  Li provis enterigi praslogganojn kiel 'dua lingvo por ĉiu' – kiu feliĉe jam pluiris ĝis la mortosojlo. En Nepalo pro jama plurlingvismo, Esperanto ne povas esti la dua. Samo validas tra amaso da pliaj landoj. Pli bone 'Komuna lingvo por ĉiu' aŭ 'Fascina lingvo je dispono de ĉiu'.

Menciu Esperanton ene de aliaj kuntekstoj. Ne rekte pledu, ke 'lernu!'sed kreu situacion en kiu la informato mem volos eklerni. Ne timu doni personajn spertojn pri la uzado kaj utilo.

**La partoprenintoj de la 20a Seminario pri Aktivula Maturigo, okazinta inter la 27a kaj 29a de februaro 2016, faras la sekvajn rekomendojn:**

1. Investu pli signife en edukado.
2. Kreskigu eblojn por novuloj frue partopreni internaciajn aranĝojn.
3. Kuraĝigi partoprenon en la librolega projekto 'Sumoo'
4. Reklamu pli bone fondusojn por partoprenigi junulojn kaj indulojn en aranĝoj.
5. Niaj varbagadoj, kursoj kaj AMO-seminarioj estu interesaj.
6. Okazigu regule AMO-seminariojn en aziaj landoj.

La tago fermiĝis per forumo; la kvar gvidintoj formis la panelon.



Post hezita komenco (silento), venis unu/du demandoj aŭ komentoj, sekvis tumulto tra tuta horo. Ni do modifis la planon, ke komence de la tria tago, la forumo estis daŭrigita tra plia intervenriĉa horo. La lasta tasko estis rememori la programerojn tra la lastaj tagoj kaj fari kelkajn rekomendojn, kiujn vi povas legi en la antaŭa paĝo.

## Esploroj por Fonduso 'Espero'

La kunorganizado de la seminario AMO 20 konsistigis nur parton de la taskaro por la vicprezidanto de UEA en Nepalo. La dua ĉefa devo estas detale taksi la nunan staton de la oficejo de NEspA. Aperis nova elemento – deziroj konstrui novan domon por servi al la sudazia regiono sur tereno posedata de la Asocio 6 km de la urbocentro de Katmanduo. Temas pri pli perspektiva plano, tamen tio eniras la raportovicon. En la 29a de februaro iris al la estraro de UEA kaj ĝiaj observantoj raporto pri tiu tereno kaj la konstrudeziroj. En la 1a de marto iris al la samaj ricevantoj raporto pri la nuna oficejo. Ambaŭ ampleksis ĉ. du paĝojn, kune kun skizmapoj kaj fotoj. En la1a de marto tagfine iris la tria dokumento al la tri kuratoroj de la Fonduso 'Espero' kiu suplementis la du pli fruajn dokumentojn. La tria aranĝis la erojn pri la oficejo kaj tereno en vicordo konforma al la celoj de la Fonduso. Ĝia unua celo estis subteni viktimojn aŭ vunditojn de la tertremo. Post multaj esploroj, ne eblis trovi iun ajn esperantistan viktimon. Nova potenca varbslogano: 'Lernu Esperanton – tio protektos vin kontraŭ tertremoj'. Eĉ ne spureblas esp-istoj kiuj suferis materiajn damaĝojn. Manke de novaj malkovroj, tiu elemento estas fermebla.

La sekvaj prioritatoj rilatas al la oficejo de NEspA, montrita en la foto (farita de Pradip Ghimire) kun la stratvido ekde la tria etaĝo. Videblas la banderolo de la oficejo en la kvina etaĝo.

La dua prioritato estas riparigi aŭ anstataŭigi damaĝitajn komputilon kaj printilon, la tria riparigi plafonojn damaĝitaj per akvoenfluo. Kvara estus finekipado de la du nune uzeblaj salonoj, per mebloj, retaliro ks.



La kvina estas bonigi du pliajn salonojn, nun apenaŭ uzeblaj, lavejon kaj kuirejon. La ideo pri nova domo povas atingi nur la sesan lokon.



La kuratoroj eble fiksos aliajn prioritatojn, sed ili povas almenaŭ fari tion surbaze de pli ampleksaj informoj kaj jam proponita buĝeta strukturo. Post reveno al Katmanduo en la 8a de marto, ni sidos kune en la oficejo kaj kompilos pliajn datumojn kaj provos fari kostotaksojn por la diversaj elementoj.

Do, la dua ĉefa tasko klare ko-mencita, survoje sed bezonanta pliajn laborojn.

2an de marto, tajpita en saltodanca minibuso

Aspekto de la oficejo baldaŭ post la tertremo



La tereno de NEspA, sur kiu estas planoj por iam konstrui centron por servi ne nur al Nepalo sed ankaŭ al la Sudazia regiono – do ĉefe Hinda Unio, Pakistano kaj Srilanko. La Asocia tereno troviĝas tuj antaŭ la blanka domo en la foto kaj etendiĝas ĝis strateto, ĉ. 120 kvadrataj metroj entute. Foto: Pradip Ghimire.

Vortoj: 870

NP 2016-03-02 EKO 7 fino de AMO 20.doc

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Por vidi pli malnovajn komunikojn iru al: www.uea.org/vikio/Komunikado_kun_LA,_FA...

PDF farita de Nuance Power PDF